



# ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO

P.K. 39004, TEL-AVIVO

N-ro 69 - SEPTEMBRO 1979



האספרנטיסט הישראלי

בטאון הליגה לאספרנטו בישראל


ת.ד. 39004, תל-אביב

העורך: אלכסנדר מנור

חוברת 69 - ספטמבר 1979

## ENHAVO

E.L.I. 1968 - 1979	J. Ŝ.	1.
La preĝo: L.L. Zamenhof. trad. I. Olsvanger		2.
Leo Wiener	B. Golden	4.
Israelaj Esperantistoj: Ota Ginz		6.
El la kantoj pri lando de mia amo:		9.
L. Goldberg . trad. J. Kohen-Cedek		
Verda somero	J. Ŝemer	10.
Vizitante S.A.T. - kongreson:	J. Ben-Alter	11.
3 semajnoj en Esperantujo	E. Haroun	13.
Malfrunoktaj pensoj	A. Kerbel	14.
Amo kaj devo	D. Mager	15.
<u>Angulo de J. E. L. I. -</u>		
Kiel forigi ĝenan kart-trukiston:		
S. Likuk. trad. E. Zalcmán		16.
Krucvortenigmo de la paco	G. Vardi	17.
Letero al la Redakcio	L. Lapenna	18.
El la Movado kaj agado		19.
Wolas korespondi		21.



# ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO de ESPERANTO - LIGO  
EN ISRAELO  
P.K. 39004, Tel Avivo  
N-ro 69 -septembro 1979

Ĉefredaktoro -  
Aleksander Manor  
redaktoro -  
Josef Ŝemer

## E.L.I. 1968 - 1979

En la jaro 1979 venis al sia fino 11-jara periodo dum kiu servis s-ano A. Manor, kiel prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo.

11 jaroj certe ne estas mallonga tempo. Dum tiuj ĉi jaroj okazis en E.L.I. multaj ŝanĝoj; fakte la Ligo tiutempe ŝanĝigis el eta grupo al aktiva Movado, ĉio-tio okazinta sub la fidela gvidado de la prezidanto, s-ano A. Manor.

Kio estis farita? Kiel aspektis nia Movado en 1968? Tiam grupo da samideanoj sen komforto ĉiusemajne okupadis ĉambregon ĉe str. Kaliŝer en Tel Avivo, interparolante esperantlingve, sed tro ofte ankaŭ kverelante. La unua ĉefa tasko de tiam nova prezidanto estis forigi la kverelojn kaj krei pacan etoson. Tiel fariĝis ebla la plua progreso de la Movado.

La dua grava paŝo estis prizorgado de senpaga loko en Tel Avivo, kiu servos kiel rekontiĝejo por la samideanoj, ĉar mankis al ni la mono por lupago.

Kiam ni ricevis unuafoje en la historio de nia Movado konvenan senpagan klubojon, oni komencis zorgi por plenigi ĝin per enhavo. Tiel estis enkondukita kulturo agado en la kluboj. Ankaŭ tio-ĉi okazis sub la direktado de s-ano A. Manor.

Alia grava agado de la prezidanto estis koncentrigado de grupo da aktivuloj, kiujn ligu la komuna pozitiva celo antaŭenigi la Movadon kaj ne malpacaj diskutoj antaŭe karakterizantaj la kunsidojn.

Tiuj ĉi miaj vortoj aperas nun en la revuo I.E. (antaŭe Nia Ligilo), redaktita dum multaj jaroj de A. Manor. Antaŭe ĝi estis nur bulteno, informil-karakterata. Nuntempe ĝi estas 20-paĝa periodaĵo diverstema disaŭdiganta nian voĉon en la vastan Esperantion.

2.

Mencii ĉi tie ĉiujn kromajn atingojn de E.L.I. faritajn dum la lastaj 11 jaroj ne eblas, kompreneble; Ni aldonu nur kelkajn el ili: kreado de junulara Movado (J.E.L.I.) neniam antaŭe ekzistanta, gvidado de kursoj de E-o, parte ebligantaj dank' al la helpo de la Tel-Avi-va urbestro, pligrandigo de la kluba biblioteko ktp. Mallonge: sub la prezidanteco de s-ano Manor ni kreis bazon por E-o-Mov. en Israelo. La fundamento kreita kaj nun ni devas aldoni sur ĝin la konstruaĵon.

Ni kore dankas al la estinta prezidanto A. Manor pro lia multjara senĉesa laboro kaj samtempe deziras al la novelektita prezidanto de E.L.I., s-ano J. Ben Alter, fruktodonan agadon kaj sukcesan entreprenadon de daŭriga movada laboro.

J. S.



HEBREA TRADUKO DE "LA PREGO"

Esperanta originalo-L.L. Zamenhof. trad.-d-ro I. Olsvanger

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,  
 Fortego, la mondon reganta,  
 Al Vi, granda fonto de l' amo kaj vero  
 Kaj fonto de vivo konstanta,  
 Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas  
 Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,  
 Al Vi, kiu kreas, al Vi, kiu regas,  
 Hodiaŭ ni preĝas.

אליך, איתן מסתורין ללא תואר  
 גבורת-עולמים המושלת,  
 מקור אהבה, מקור קושט וזוהר  
 ומקור חיי-נצח בחלד,  
 בשמות מרובים בני אדם יכנון,  
 אך כלם כאחד בלבב ירגישון,  
 לך היוצר, לך מולך סלה  
 היום נתפללה.

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,  
 Kun dogmoj de blinda fervoro:  
 Silentas nun ĉiu disput' religia  
 Kaj regas nur kredo de koro.  
 Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,  
 Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,  
 Ni staras nun, filoj de l' tuta homaro  
 Ĉe Via altaro.

לא קנאת לאומים הביאתנו עדיך,  
 לא את ריב אמונות פה נריבה;  
 ידום כל ויכוח דעות לפניך.  
 רק הדת שבלב לך נקריבה!  
 היא אחת לכל נפש אליך רוטטת,  
 היא רום האמת, לא בקרב מתפשטת;  
 כולנו בניך בשמה התאספנו  
 כי אליך נכספנו.

3.

Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,  
 Por reunuigi l' homaron.  
 Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,  
 Sed lasu nin venki la baron;  
 Donacu Vi benon al nia laboro,  
 Donacu Vi forton al nia fervoro,  
 Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj  
 Nin tenu kuraĝaj.

לא יהוד בני-אנוש את ידינו נשאנו,  
 האימן יברך מלחמתנו!  
 כולנו למלאכת-הקודש נשבענו,  
 נא לנפול נואשים אל חתננו!  
 חן ברכת חסדך על הדרך בחרנו,  
 כי כוח נשאך מכל סכר עברנו,  
 ונגד כל צד אמן בחסדך  
 לבוח נאמניך!

La verdan standardon tre alte ni tenos;  
 Ĝi signas la bonon kaj belon.  
 La Forto mistera de l'mondo nin benos,  
 Kaj nian atingos ni celon.  
 Ni inter popoloj la murojn detruos,  
 Kaj ili ekrakos kaj ili ekbruos  
 Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero  
 Ekregos sur tero.

זה דגלנו ירוק, אוח פאר לודכנו  
 אוח-אמת, סמל יופי נגביה!  
 איתן עולמים ממקומו יברכנו  
 ולחוף כיסופינו נגיעו  
 התומות בין עמי ארצך נפורדה,  
 אבניהן נפוצץ, ציריהן נשברה,  
 ותשלוט על הארץ אורה חייבתך,  
 יופי אמיתך!

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,  
 Sed ĝi sin dividis batale;  
 Popolo popolon atakas kruele,  
 Frat' fraton atakas ŝakale.  
 Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,  
 Aŭskultu la voĉon de l' preĝo sincera,  
 Redonu la pacon al la infanaro  
 De l' granda homaro!

חלקה לגזע-אנוש מיופיק,  
 והמה בקטל יריבו;  
 זה על זה כחיות מתנפלים יצוריק,  
 ותרבם לנדנה לא ישיבו.  
 זה איתן מסתורין, נא קבל חינונו,  
 הקשיבה לחחן יוצא מלבנו:  
 בך נא בחסד, בשפע שלומך  
 כל נברא בצלמך!

## LEO WIENER (1862 -1939)

En la jaro 1862, tri jarojn post la naskiĝo de Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko, Pollando, venis en la mondon en la sama urbo alia knabo, Leo Wiener. Ankaŭ li poste okupiĝis pri la internacilingva demando.

Dokumentoj pri la historio de la familio Wiener estas malabundaj, ĉar multe pereis dum la dua mondmilito, kiam la nazioj atakis Bjalistokon. Inter la prauloj de L. Wiener estis Akiba Eger, rabeno de Poznań; aliaj membroj de la familio estis la eldonistoj de la Jerusalema Talmudo, kiu aperis en Krotoszyn en 1866.

Oni ne scias, ĉu L. Zamenhof kaj L. Wiener konis unu la alian, kiel knaboj en Bjalistoko. La fruan edukadon ili ambaŭ ricevis en Bjalistoko. Poste L. Wiener iris al belorusia urbo Minsk por lerni en klasika gimnazio tie.

La hejma lingvo de la familio Wiener estis la germana. L. Wiener estis asimiliĝemulo kaj neniam apogis cionismon, kontraste kun la ideoj de la juna L. Zamenhof.

Je tre frua aĝo L. Wiener fariĝis poligloto kaj kvazaŭ estis destinita fariĝi filologo. Li parolis, kompreneble, la ŝtatan lingvon, la rusan, kaj ankaŭ la polan, ĉar li simpatiis kun la tiutempaj polaj aspiroj je kultura kaj politika sendependeco. Loĝante en la orient-eŭropa juda socikultura medio, li sciis ankaŭ la hebrean kaj la jidan lingvojn. Li parolis la francan lingvon kiel membro de la edukita tavolo de tiea socio kaj la italan. En la gimnazio li lernis la klasikajn lingvojn, la helenan kaj la latinan kaj en siaj aŭtobiografiaj artikoloj li fiere rakontas, kiel li proprigis, al si la nederlandan, danan, serban kaj grekan lingvojn, estante ankoraŭ adoleskanto (L. Wiener, 1910).

Jam kiel 13-jarulo L. Wiener komencis vivteni sin finance, instruante siajn samlernejanajn. Je la aĝo de 15 jaroj li iris al Varsovio por daŭrigi sian mezgradan edukon en unu el la filologiaj gimnazioj de tiu urbo. Tiutempe li renkontiĝis kun sia antaŭa samurbano, L. Zamenhof, kies familio jam fine de 1873 transloĝiĝis al la pola ĉefurbo. En Varsovio la juna L. Zamenhof frekventis la 4-an klason de la 2-a Filologia Gimnazio, kiu ne estis la sama lernejo, kie studis L. Wiener.

Mankas detalaj informoj pri la interrilatoj en Varsovio de la du knaboj el Bjalistoko, sed unu signifplena afero ligas L. Wiener al la historio de la E-o - movado, aŭ prefere, la pra E-o - movado. Li estis unu el la kamaradoj de L. Zamenhof, kiu lernis Lingve Uniwersala-n la plej fruan formon de E-o. La 19-jara planlingvisto debutigis ĝin en 1878, antaŭ unu jarcento.

La 17-an de decembro en tiu jaro, okazis festo en la zamenhofs hejmo, kiun ĉeestis la familianoj de Ludoviko kaj ses aŭ sep gimnaziaj kolegoj kaj amikoj.

La knaboj prezentis paroladetojn en Lingve Uniwersala. Post la memorinda solenaĵo de la Tago de la Vivigo de la Universala Lingvo, la vivovojoj de L. Zamenhof kaj L. Wiener komencis disbranĉiĝi. Zamenhof abiturientiĝis en 1879 kaj iris al Moskvo por studi medicinon ĉe la tiea universitato. Leo Wiener elektis saman karieron kaj en 1880 eniris la fakultaton pri medicino de la Universitato de Varsovio. Sed li baldaŭ trovis, ke li ne taŭgas por tiu profesio, do li iris al Berlino por studi ĉe la Politeknika Instituto. Ankaŭ en tiu studtereno li mistrafis la celon. La sola rimedo por la 20-jara maltrankvila junulo estis serĉi pli inspiran sociomedion aliloke, do li elmigris al Ameriko.

Li elŝipiĝis en la usona haveno Nov-Orleano kun kelkaj cendoj en poŝo. Dum la sekvaj jaroj li laboris kaj vagadis tra la suda kaj meza partoj de Usono kaj fine ekloĝis en la ŝtato Misurio.

Estante intelektulo, li turnis sin al la instruado. La unua studobjekto, al kiu li dediĉis siajn talentojn, estis matematiko - li ja pasigis du jarojn preparante sin por la inĝeniera profesio - sed poste li okupiĝis ekskluzive pri lingvoj. De 1892 ĝis 1895 li estis subprofesoro pri latinidaj kaj germanaj lingvoj ĉe la Universitato Misurio. En 1895 li transloĝiĝis al Bostono, ĉe la orienta marbordo de Usono, por instrui lingvojn. En 1896 li en la Universitato Harvard fondis la unuan fakon pri slavistiko en usona universitato. Li estis promociita al universitata profesoro en 1911. Li emeritiĝis en 1930 kaj mortis en 1939.

Same kiel Zamenhof, li interesiĝis pri la jida lingvo, kaj en 1899 aperis en la angla lingvo lia historio de la jida literaturo de la 19-a jc.

Dum renkontiĝo en 1909 ĉe la Universitato Harvard kun la dana filologo kaj interlingvisto Otto Jespersen, Wiener pritraktis la temon de internaciaj lingvoj kun sia kolego. Tiutempe Jespersen estis aktiva en la nova Ido - movado kaj fervore probatalis ĝin. Male, Wiener, seniluziiginte, estis skeptika pri la ebla sukceso de planlingvo (Jespersen 1977, p.22-23.)

Manke de kompleta bibliografio de liaj verkoj mi povas citi nur du verkojn pri planlingvoj. Ambaŭ estas publicitaj germanlingve en berlina scienca revuo en 1907. En sia artikolo pri E-o, Wiener skribas kiel profesia filologo kaj akcentas la "difektojn" de la lingvo de sia iama amiko. Cetere, li kritikis ĝenerale la valoron kaj praktikecon de iu ajn planlingvo, argumentante, ke tia lingvo, por povi konkuri sur ĉiuj niveloj kun etnaj lingvoj, devos havi same komplikan idiomaĵan enhavon, kaj pro tio, ĝi fariĝos same malfacila kiel la etnaj lingvoj (L. Wiener, 1907). L. Wiener, kvankam atingis sukceson kiel filologo, estis eklipsita de sia filo Norbert Wiener, la plej eminenta usona matematikisto de la 20-a jc. kaj patro de la kibernetiko (Norbert Wiener, 1964).

## ISRAELAJ ESPERANTISTOJ

OTA GINZ (1896-1976)Partoj de lia aŭtobiografio, verkita en 1971.

Mi naskiĝis la 19-an de julio 1896 en Ždánice, Ĉeĥio, vilaĝo situanta iom oriente de Praha.

Kiel antaŭlerneja infano mi kun miaj gepatroj kaj kvar gefratoj translokiĝis al Praha. Krom mia patro, mortinta en 1912 pro malsano, ĉiuj s.n. personoj, t.e. la patrino kaj kvar gefratoj, ankaŭ iliaj familioj kaj mia filo, naskiĝinta en 1928, pereis per nenatura morto fare de hitleranoj.

Mi ne estis ankoraŭ 12 jara, kiam rekomendis al mi mia patro lerni E-on, prezentinte al mi la tiam ĵus aperintan ĉeĥan ŝlosilon. De tiam ĝis nun, kiam mi estas 75-jara, tenas min la internacia lingvo firme en siaj brakoj.

La rekompenco, kiun ĝi al mi prezentis, ne igas min bedaŭri la klopodojn, kiujn mi al E-o dediĉis.

Mi ekhavis rapide la plezuron kaj honoron, resti ekde tiu aĝo daŭra amiko de tiamaj elstaraj ĉeĥaj E-o - pioniroj Ĉejka, Kamarýt, Kuhn, Bouška kaj aliaj...

Al UEA mi aliĝis proksimume en la jaro 1912 kaj forirante baldaŭ poste batali en la aŭstro-hungara armeo, mi kunportis kaj poste vigle uzis la UEA-jarlibron.

La jarlibro kaj la hungara ŝlosilo iĝis por mi nefor-penseblaj instrumentoj, kiam mi iĝis militkaptito en la rusa fronto. Foje mi kun miaj kamaradoj estis transportita al iu malproksima loko. Haltinte tiam en Lugansk kaj trovinte, ke tie deĵoras UEA - delegito, Viktor Kotlevcev, mi simple forlasis vagonon kaj feliĉe trovis tiun samideanon. Firma ĉirkaŭbrako kaj verva interparolo antaŭis mian bedaŭrinde urĝan reiron, ĉar mi ne povis riski minacantan ekomovon de la vagonaro. Kia idilio kompare kun pli postaj cirkonstancoj! Kun Kotlevcev mi havis ankaŭ interesan postmilitan sperton. Mia vigla E-o-agado komenciĝis tamen nur en Irbit, felfoira urbo post la montaro Ural. Tie renkontis min ĉeĥo, post sia reveno konata kiel verkisto Valenta - Alfa, kiu sciis iom E-on kaj mi tuj amikiĝis. Tiam mi estis jam en rilato kun E-o-grupo "Espero" en Petrograd. Mi priskribis al ili mian iom nefacilan staton. Estis vintro kaj oni forprenis de ni ĉiun iom varmigan vestaĵon, same ŝuojn kaj ni estis nutrataj per neniel sufiĉa manĝo. Multaj militkaptitoj ne eltenis kaj mortis. Mia milda priskribo tuŝis la petrogradan grupon. En ilia baldaŭ alveninta letero alparolis min ilia gvidanto Gajdovski per "Frato de Verda Stelo" kaj sendis ripete vestaĵon, ŝuojn kaj monon.

Kiam ekregis en Petrograd por mallonga tempo Kerenski (1917), okazis diversaj novaĵoj pri militkaptitoj. Mi kun aliaj estis tiam sendita el norda parto de tiu grandega regno suden en regionon de Donaj kozakoj, kie estis manko de laboraj fortoj. Tie mi vivis en fami-

lio de Ŝoloĥov, laborante en muelejo, apartenanta al patro de la poste fama verkisto Miĥail Ŝoloĥov. Tiu ĉi estis mia amiko, kun kiu mi pasigis multajn agrablajn momentojn. Tiam mi rilatis ofte ankaŭ kun lia gimnazia instruisto Stefan Bogdanov, UEA-delegito en Novoĉerkask, ĉefurbo de dona distrikto. (Don -rivero en Sovetio).

Kiam mi, fininte mian soldatan deĵoron, aperis denove en Praha mi tuj serĉis okazon por kunlaboro en tiam leviganta E-o organizo.

En la tutŝtata plej disvastigita ĵurnalo Národní Politika mi publikigis grandformatan informon pri E-o-kurso, aranĝota en Praha. Mi nun atentigas pri grava cirkonstanco, ke ni presigis la anoncon sur aparta folio, kiun Národní Politika enmetis en ekzemplerojn en gazeto, distribuotajn en la internaj kvartaloj de la urbo, kie la kurso estis okazonta.

Ne estis facile antaŭvidi la sekvojn de alispeca laboro, kiun mi komencis en 1925. Tiam mi liveris al la revuo Radio-ĵurnal en Praha ĉeĥan tradukon de la verko "Babiladoj pri radio", kiun skribis en E-o Eŭgeno Aisberg en Parizo. Kiam ĝi sub nova titolo "Fine mi komprenas la radion" aperis 1934 en la eldonejo "Literatura Mondo" en Budapeŝto, diris ĝia aŭtoro en antaŭparolo, ke la libro estis finita nur dank' al insistado de Ota Ginz. Montriĝis, ke mi, Ginz, estis prava, insistante. La ĝis tiam nekutima maniero prezenti humore sciencan temon kaptis atenton de la plej potenca eldonejo ĉeĥa Orbis, kiu mem proponis al mi libran eldonon. Gvidantoj de tiu eldonejo kaj ankaŭ funkciuloj de la burĝonanta ĉeĥa radio akceptis la fakton de la unua peresperanta verko tiel simpatie, ke mi ne troigas, supozante, ke la posta amika akcepto de E-o en la ĉeĥa radio kaj ĝia ampleksa uzo havas siajn radikojn en tiu i ŝajne senpretenda verko.

En 1927 mi transdonis al presejo en Praha manuskripton de kvinlingva Radioamatora vortaro kaj tuj poste mi ekdediĉis miajn fortojn al plia disvastigo de Aisberga verko. Estis ampleksaj klopodoj, daŭrintaj multajn jarojn. Estis vera monto da korespondaĵo, tuŝanta grandan parton de la terglobo. La Aisberga verko ekzistas hodiaŭ en 27 lingvoj. En la rusa lingvo ĝi aperis en pluraj centmiloj da ekzempleroj. En 1926 eldonis la finna ilustrita revuo Otavainen specialan "Ĉeĥoslovakian numeron", pri kiu mi interkonsentiĝis kun la fama finna e-isto Wilho Setälä dum mia vizito al Finnlando.

Oni komprenas, ke E-on kiel pontlingvon oni povos plej riĉe praktikadi precipe kun landoj, kies lingvoj ne estas sufiĉe konataj reciproke. En Fora Oriento mi havis grandan nombron da kunlaborantoj, kiuj publikigis en siaj lingvoj multe de miaj E-o - tekstoj, tradukitaj el lingvo ĉeĥa. Tiamaniere aperis en pluraj ĉinaj eldonoj la poemlibro "Ĉina rideto", eldonita en Tientsin, Ĉinio, en la



jaro 1957 kaj poste ankoraŭ en pluraj eldonoj, 72 paĝoj, de Marie Pujmanová kaj amaso da tradukaĵoj aliaj. Ankaŭ en ĉina traduko de Svejk-libro ni multe kunlaboris kaj liveris al ĝi specialan antŭparolon, kiun mi prizorgis ĉe Hašek - Jokulo Anĉik. Kun unu el la ĉefaj japanaj tradukantoj el lingvo ĉeĥa mi estas ĝis nun en ofta rilato.

Pli malofta estis mia kunlaboro kun aliaj aziaj landoj. Tamen mi ricevis dankon de la Hebrea Universitato en Jerusalemo, kiam mi al ĝi sendis vjetnaman tradukon de hebrea poemo, kio estis la unua alproksimiĝo de tiuj du lingvoj. Ĝin faris Dao Anh Ka laŭ mia E-o-teksto. Ankaŭ kun Kamboĝo mi traktis sukcese pri tiulingva eldono de mia hebrea teksto, liverita en E-o.

Ekde mia veno al mia nova patrujo Israelo (1956) mi konsideris, ke mia devo estas utiligi E-on en servo de la hebrea kulturo. Mi posedas belan kolekton de miaj pere-aj tradukoj el la hebrea, kiuj efektiviĝis per mia klopodo. Mia sola libra E-o - traduko el hebrea lingvo estas "Freŝa mateno" de Reuven Kric, eldonita en Israelo en 1967, 280 paĝoj. Mi faris tiun tradukon, kiam oni preparis E-o - kongreson, kiu bedaŭrinde ne okazis.

Pri Israelo temas ankaŭ la verko "Sekaigo Kodomo" (La infanoj de la mondo), kies materialon mi kolektis kaj tradukis en E-on. Tiun ĉi laboron mi faris antaŭe koncerne la ĉeĥoslovakon parton de la sama verko.

Pri iuj plu tradukoj mi eksciis nur hazarde. La fundamenta E-o - verko pri ĉeĥoslovaka literaturo "Ĉeĥoslovaka Antologio", (eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt, jaro 1935, 465 p.), kies mi estis inicianto kaj kune kun Stanislav Kamaryt ĝia redaktoro, estis tradukita parte en lingvon ĉinan. Ekzistas du libretoj: "Kolekto de ĉeĥoslovakaj poemoj" kaj "Kolekto de ĉeĥoslovakaj rakontoj", kiuj aperis 1948-1951 en Sanghajo. Ili estas la unuaj ĉinaj tradukaĵoj el ĉeĥoslovaka literaturo. La tradukinto Kuai-Huan ne kaŝis, ke E-o ebligis lian laboron, sed mi eksciis pri la fakto nur dank' al alia ĉina amiko.

Mian originalan rakonton "Israelo, lando de mirakloj", mi publikigis en la revuo "Oomoto", aperanta en Japanujo. Poste mi estis informita, ke oni ĝin tradukis kaj baldaŭ repreĝis en japanlingva revuo kaj ankaŭ en priodaĵo norvega. Ĉeĥlingva gazeto usona aperigis ĝin baldaŭ poste. Iomete similan sorton havis la rakonto "Ŝoforo de Jerusalemo" de fama hebrea verkisto Jicĥak Dov Berkoviĉ, kiun mi tradukis por la ĉeĥa revuo "Nový Orient" el la hebrea lingvo. Radiostacio Praha kreis el ĝi plaĉan dramon, kiun ĝi dufoje disaŭdigis. Nur tiam decidiĝis "Verda Prismo" publikigi ĝian E-o - tekston, kiun mi jam antaŭe proponis al mia bedaŭrinde dume forpasinta amiko Szilágyi, redaktoro de tiu revuo.

LEA GOLDBERG

משירי ארץ אהבתי

EL LA KANTOJ PRI LANDO DE MIA AMO

Ho, patrujo sen grac',  
Povra lando sen bon';  
Kun reĝin' - sen palac',  
Kun la reĝo - sen kron'!

Nur sep tagoj da sun', primaveraj,-  
Ĉar aŭtun' regas dum la ceteraj;  
Dum sep tagoj nur floras la rozoj,  
Dum sep tagoj falbrilas la rozoj,  
Dum sep tagoj - apertaj fenestroj,  
Ĉiu hom', ĉu povruloj, aŭ estroj,  
Guas sunon dum fest' de ripozo  
Kaj ĝojgajas petant' de almozo.

Ho, patrujo de bel',  
Plaga lando sen pac',  
Reĝo sen citadel'  
Kaj reĝin' sen palac' !


Nur sep tagoj da festoj dum jaro,  
La cetero - de zorgoj, penfaro;  
Dum sep tagoj ĝojbrilas kandeloj,  
Dum sep tagoj - regalaj boteloj,  
Dum sep tagoj la homoj - nobeloj,  
Kiel par' gefianĉa, beata  
Pie preĝas dum tago sabata.

Ho, multplaga la ŝtat',  
En amar', sen renom';  
Via reĝ' - sen ornat',  
La reĝino - sen dom'.  
Sole mi vin laŭtlaŭdas surtere,  
Sed insultas vin ĉiuj cetero.

Tial vagas mi tra ĉiuj lokoj,  
Tra ĝardenoj, valkampoj, montrokoj;  
Viajn ŝtonojn ruinajn, dumire  
Mi kolektas per sak', suvenire;  
En fremdurboj, bazaroj, strat' korsa,  
Mi prikantas kun gurdo surdorsa  
La patrujan sublimon, admire.

El la hebrea: J. Kohen-Cedek





### VERDA SOMERO

Sendube la kulmino de la Esperanta agado por ĉiu uzanto de la Internacia Lingvo estas dusemajna partopreno en ĉiusomere (almenaŭ laŭ nordhemisfera vidpunkto, ĉar en Brazilo, ekz., vintras dum aŭgusto) okazanta Universala Kongreso (UK) de UEA. Sed se li/ŝi estas junul(in)o (ni diru, ĝis la aĝo 35, proksimume ...) li/ŝi havas ĵaluzindan bonŝancon plilongigi tiun ĉi kulminan okazaĵon ĝis 2 semajnoj, ĉeestante ankaŭ IJK-on (Internacia Junulara Kongreso); kaj tiun ĉi bonŝancon mi ankoraŭ (...) havas. Tial ĉi jare mi iris al tia Esperantujo, kiu "ekis" en la meznederlanda vilaĝo Austerlitz (IJK) kaj daŭris en la pitoreska svisa urbo Lucerno (UK).

En la Aŭsterlica kongresejo, situanta ĉe arbaro, kunvenis ĉ. 400 gejunuloj el 26 landoj. ("oficiale" estis tie je kelkdekoj malpli, sed ĉiam ĉe IJK-oj estas malsameco inter la oficiala nombro de la aliĝintoj kaj tiu de la kunvenantoj). Inter ili estis ni, 5 Israelanoj, kiuj neniam krokodilis, laŭtradicie!

La loĝ- kaj manĝkondiĉoj tie estis tre (laŭ kelkuloj eĉ tre) modestaj. Ekz. - oni loĝis amase - 20 (ĝenerale samseksaj) en unu dormhalo; oni manĝis multe da bruna pano (verdire, tre bongusta) ktp. Sed ĉio tio ne malhelpis al la bona juneca etoso, kiu regis dum la tuta kongresa semajno. Eble eĉ male!

Ni havis diversspecan aktivecon: laborgrupoj pri variaj temoj (kiel-esperantologio, kurso de la nederlanda lingvo, interŝtata popoldancado); prelegoj kaj seminarioj pri la kongresa temo "Interŝtataj unuiĝoj - kiucele?"; kulturaj kaj distraj vesperoj; tuttaga ekskurso al la norda parto de Nederlando kaj - kiel kutime - la tiel ŝatataj neoficialaj eroj de ĉiu Junulara Kongreso: la interamika babilado inter diversnaciaj gejunuloj, kantaĵo, dancado kaj malfrunkta (foje eĉ frumatena) enlitiĝo; do - gaja esperantumado en amikeca internacia etoso.

Post tiu ĉi ekscita semajno mi iris al Lucerno. En la bela ĉelage situanta ĉefurbo de la samnoma kantono Lucerno kongresis ĉ. 1600 esperantistoj, el ili 11 Israelanoj. En la luksa kaj tre komforta kongresejo okazis preskaŭ ĉiuj programeroj de la 64-a UK. Mi mencias nur kelkajn el la multaj interesajoj, kiujn mi povus prezenti ĉi tie.

Dum la solena Inaŭguro entuziasmigis nin la prezentiĝo de ĉiuj partoprenantoj de la Infana Kongreseto (pli ol 20 ĉarmaj infanoj), kiuj suriris la podion kaj laŭvice elparolis al la mikrofono la nomon kaj la devenlandon.

Dum la solena Malfermo de la kongreso bele salutis la ĉeestantojn en la nomo de ELI s-ano Matilda Landaŭ de Tel Aviv. Ŝi menciis interalie la decidon ĵus faritan de nia Ligo gastigi UK-on en Israelo dum unu el la proksimaj jaroj (kiu cetere efektiviĝos plejverŝajne ne

antaŭ 1984).

Ĉi jare abundis la artaj aranĝoj en kies kadro elstaris operkantistoj kaj muzikludantoj el la slavaj landoj. La populara e-ista kantisto Oliver Tzaut kantis antaŭ la tuta kongresanaro "Rabenon Elimeleĥ", tradukitan de la jida lingvo.

Amikecaj renkontiĝoj okazis kiel ĉiujare inter la 2 konataj samideanoj el Egiptujo, M. Isaac kaj T. Megalli, kaj niaj samlandanoj.


La lucerna vetero, same kiel tiu de Nederlando, ne favoris Esperanton... Pluvo (aŭguste...) kaj malvarmeto bonvenigis nin kelkfoje dum ekskursoj faritaj en kadro de la Kongreso, ĉu temis pri la famaj montpintoj en la ĉirkaŭaĵo de la kongresurbo ĉu pri la itallingva urbo Lugano kien mia ekskursgrupo veturis tuttage.

Nepreterlasebla punkto estas la multkosteco de ... ĉio en Svislando, almenaŭ por la poŝto de Israelano. Unu kongresano diris, ke la plej bona rimedo por fari maldikigan dieton estas kongresi en svisa urbo.

Resume, mi povas diri, ke mi bedaŭras nur unu aferon - tion ke mi estis devigita maltrafi multe da interesaj programeroj de la UK, kio estas neevitebla pro ilia multnombro kaj denseco. Mi ŝatus aŭskulti pli da prelegoj en kadro de la dumkongresa Internacia Somera Universitato, ĉeesti pli da publikaj diskutoj pri la kongresa temo "La lingva aspekto de internacia organiziĝo", konatiĝi kun pli multaj ges-anoj kaj babili kun pliaj japanoj, flandrinoj, gekatalunoj kaj aliaj; sed la tempo kuris kaj oni jam kunkantis "La Esperon" en la Fermo-ceremonio de la Kongreso!

Ĝis la revido venontjare - en Finnlando (IJK) kaj en Svedlando (UK)!

J. Ŝemer



J. Ben Alter

### VIZITANTE S.A.T. -KONGRESON

Se mi vizitos la francan urbeton Boĝe (Baugé) kun ĝiaj mallarĝaj stratetoj kaj diversaj vidindaĵoj kaj atingos la Zamenhof straton, restos ankoraŭ preskaŭ 2 kilometroj por promenadi tra la ŝoseo ĉirkaŭita de verdaj kampoj kaj arbaroj por atingi la kastelon Grezilion (Gressillon).

Veninte tien mia edzino bedaŭris, ke nia limigita tempo ne permesas al ni resti en tiu agrabla esperantista renkontiĝejo pli ol unu semajnon. Ankaŭ mi bedaŭris tion.

Akceptis nin en oficejo s-ano Babin. Ni ricevis belan ĉambron. Tra la fenestro ni senĉese rigardis la belan arbaran ĉirkaŭaĵon kaj la lageton, en kiu la vizitantoj banis sin.

Ni trovis tie vizitantojn el diversaj landoj. Ĉe nia manĝotablo sidis japanaj junaj geedzoj kun 3 infanoj, s-anino el Irano kaj s-ano el Germanio. Ni la tutan tempon gaje interparoladis dum la manĝo. La simpatia s-anino Babin ĉiufoje demandis, ĉu ni estas kontentaj, ĉu la manĝaĵo bongustas, aŭ ĉu ni ion deziras.

Ĉe la apuda tablo sidis gejunuloj el diversaj landoj. Ili ŝercis kaj kantetis kontentaj, ĉar ili ne sidas kune kun la enuigaj plenaĝuloj. Tio memorigis min, ke antaŭ unu semajno, dum la S.A.T.-kongreso okazinta en Swanwick (Britio), mi spertis la saman. La gejunuloj kaptis en manĝejo apartan tablon kaj kiam la gekongresanoj faris komunan foton, la gejunuloj faris kelkajn fotojn, sed ne kune kun la maljunuloj.

Mi diris al ili:

-Ne longe daŭros kaj viaj infanoj ankaŭ faros fotojn, sed ne kune kun vi.

Unu el ili respondis:

-Mi jam senpacience atendas tiun momenton.

En tiu tempo okazis en kastelo Gresillon tri kursoj por la progresantoj, du fojojn tage, sub la gvidado de s-anino B. Cheverry. Ankaŭ la infanoj el diversaj landoj havis sian okupon. Ili sidis ĉirkaŭ la tablo. Ĉiu el ili ricevis kajeron kaj diverskolorajn kraĵojn. La simpatia instruistino demandis iun knabeton:

-Ĉu vi estas knabino?

Ringromontrante la knabinetojn li respondis nerveme:

-Ne, ili estas knabinoj. Mi estas knabo.

Ĉiuvespere okazis tie prelegoj kaj unu fojon okazis gaja teatra prezentado.

Mi eluzis la okazon kaj prelegis pri la esperanta movado en Israelo kaj finis per judaj anekdotoj. La ĉeestantoj rekompencis min per laŭtaj aplaŭdoj.

Vizitante Francion, nepre vizitu la kastelon Gresillon!

Ni ankaŭ vizitis en Parizo S.A.T.-oficejon. K-do Barkoviĉ prizorgis por ni en la hotelo ĉe proksima strato oportunan ĉambreton malmultekostan kun matenmanĝo. K-do Uzé ĉiutage promenadis kun ni kaj montris al ni diversajn vidindaĵojn, kiujn mi kun kontento vizitis. K-do Bartelmes, Bannier kaj aliaj invitis nin ofte viziti la S.A.T.-oficejon.

La kamaradeca akcepto en S.A.T.-oficejo memorigis min la S.A.T.-kongreson en Swanwick okazinta antaŭ tri semajnoj. Ankaŭ tie regis tre kamaradeca atmosfero. Ni vidis tie operon en esp. traduko, koncerton kaj dancojn. Ankaŭ la gekongresanoj dancis, sed ĉifoje la gejunuloj dancis ankaŭ kun pliaĝaj gekamaradoj. Ĉiutage okazis interesaj laborkursidoj kaj ekskursoj. La sep kongresaj tagoj pasis bedaŭrinde fulmrapide kaj mi devis forlasi Swanwick.

Restis tamen agrablaj rememoroj.

La lastan semajnon ni pasigis en Londono en la esperantista renkontejo ĉe la simpatiaj ges-anoj Buttinger en 3 Dafforne Road SW 17. Ili akceptis nin amikece kaj donis al ni ĉambron kaj matenmanĝon por modesta prezo. Ili ĉiam estis pretaj por servi al ni per sciigoj kaj konsilo kaj ili faris tion kun plezuro. Tie ni renkontis esperantistojn el diversaj landoj, kiuj dum vizito en Anglio ĉiam loĝas ĉe ges-anoj Buttinger.

Post agrabla pasigo de tempo ni fine ekskursis hejmen. Tio estis la plej agrabla ekskurso.

### 3 SEMAJNOJ EN ESPERANTUJO

E. Haroun

La 52-a kongreso de SAT okazis de 13-a ĝis 20-a de julio en Swanwick, Anglio.

Mia edzo kaj mi aliĝis la kongreson, la antaŭkongresan semajnon en Kimrio kaj la postkongresan ekskurson al Skotlando. Mi antaŭvidis 3 agrablajn semajnojn kune kun gekamaradoj... Ni ne seniluziĝis.

Ĉe stacidomo en Londono mi jam renkontis 15 E-istojn kaj en gaja humoro mi eniris la trajnon.

En Alfreton atendis nin la aŭtobuso kun aliaj partoprenantoj, entute 50 personoj de multaj landoj en Eŭropo kaj ni el Israelo. Post ĉirkaŭ 5 horoj ni atingis la urbon Bar-mouth apud la maro en Kimrio kaj nian hotelon.

Ĝi estas alte situanta kun vido sur pitoreska malgranda haveno kaj ĉarma urbeto. Tie ni loĝis dum unu semajno. En la arango estis tuttaga kaj duontagaj ekskursoj. Ni grimpis sur montetoj, promenis en arbaro aŭ ĉe la marbordo. Post la bone aranĝita semajno en Kimrio ni ĉiuj veturis al Swanwick. La kongreso okazis en malnova kastelo kaj en aliaj konstruaĵoj, situantaj en bela parko.

Raporton pri la kongreso vi legos aliloke. Agrable estis, ke ni ĉiuj loĝis en kongresejo. Tiamaniere ni havis la plenan eblecon ne nur partopreni arangojn, kiuj konsistis el popoldancado, orkestra muziko, opera prezentado en E-o, interesaj prelegoj, lumbildoj k.t.p. Ni renkontis multajn malnovajn konatojn kaj kune kun ili novajn amikojn. Ni ĝuis la bonan kamaradan etoson, kiu ĉiam regas ĉe kongresoj de SAT.

Post la kongreso parto de kongresanoj partoprenis postkongresan ekskurson al Skotlando. Pro la vigla gvidado de la angla kamarado ni pasigis neforgeseblan semajnon. Ĉiuvespere ni estis en alia hotelo. Ni trapasis mallarĝajn, kurbaĵajn, pitoreskajn vojojn, ĉarmajn urbetojn. Ni vidis la konatajn lagojn Loch Lomond, Loch Nes, ŝipveturadis al la "insulo de nuboj", vizitis la skotan altlandon ne vizitatan kutime de turistoj. Sed plej grava estis, ke ĝi okazis kune kun gekamaradoj, ĉiuj parolantaj la saman lingvon Esperanto.



MALFRUNOKTAJ PENSOJ

Estas ĝuste la dua nokte, kiam mi venas al la loko. Sed kie estas la aliaj? Ili ankoraŭ ne venis. Tio okazas. Kutime mi partoprenas ĉiumonatan propravolan noktgardadon kune kun mia edzino. Sed hodiaŭ ŝi ne povas. Mi elŝaltas aŭton kaj aŭskultas delikatajn radiomelodiojn.

Varma somera nokto. Ĉirpas cikadoj... Subite mi vidas ion nekutiman. El duonfermita pordeto eliras stranga estaĵo. Ĉu hundo? Ĝi venas pli proksime al lanterna lumo kaj nun mi vidas ĝin sufiĉe klare. Tre kurtaj antaŭaj piedoj, granda ĝibo, kovrita per longegaj pingloj. Ĝis nun mi vidis tiujn bestojn nur en libroj. Sed kiu estas ĝia nomo hebreo? Mi ne scias kaj ne mirinde. De la tago de mia enisraeliĝo pasis nur kvar jaroj.

Ĝis tiam mi estis ruslandano kaj lingvon mi sciis bone. Rusan lingvon. Mi eĉ verkis kantojn. Jen estas unu el ili:

Vulpino

Somera arbaro, rosguta padet'  
Flamruĝa vulpino, en dentoj birdet'  
Brilaj okuloj, menskompas': 2 foje  
Sensdelikata nigra naz'

Arbarmaldensejo, birdeta rulad'  
Ridanta ĉielo, vulpida ludad'  
Gaja saltad', petol' sen fin' 2 foje  
Ilin rigardas la patrin'

Ekpluvis ĉielo, ekstremis arbar'  
Ĉasisto ebria, en dentoj cigar'  
Palaj okuloj, ruĝa naz' 2 foje  
Lukskarabeno, ventra gras'

Sufoka urbego, enkaĝa natur'  
Laŭmoda virino, vulpida terur':  
Vitraj okuloj, mola spin' 2 foje  
Ilin rigardas la patrin'

(Ankaŭ melodio estas, sed mi ne scipovas skribi ĝin. Ne gravas.)

Vulpidojn laŭ tiu kanto oni enurbigis perforte. Sed histriko (jen estas ĝia nomo!) venis evidente libervole. Mi ankaŭ.

Longe mi vivis tie en Ruslando kaj ankaŭ gepatroj miaj kaj miaj geavoj...

Miaj geavoj. Lastfoje mi vidis ilin en 1941-a jaro. Antaŭ la alveno de la germanoj. Mi loĝis tiam ĉe ili, en la granda ukraina vilaĝo Jagotin.

Patrino prenis min, dekjaran knabon, de tie. Sed la geavoj ne konsentis forlasi lokon. Avo pereis unua. Germana soldato venis en lian frizejon por depreni ilaron.



Avo ne donis. Li estis obstina, mia avo. En apude situanta parko soldato mortigis lin. La morton de mia avino, mia saĝa kaj bonkora avino, ĉeestis mia ankaŭ dekjara kuzo. Li surgrimpis arbon kaj de tie vidis kiel ukraina samvilaĝanoj pafmortigis ŝin, mian avinon kaj patrinon lian, frat-inon 18 jaran kaj ĉiujn aliajn judojn. Ili estis nespertaj, tiuj vilaĝanoj, kaj la tero super pafmortigitoj moviĝis pli ol du tagojn.

Mi ne estis tie. Sed kiel ofte mi aŭdis plenajn de bedaŭro vortojn: "Domaĝe, ke oni ne mortigis ĉiujn!" Jes, homoj tre nevolonte toleras alinaciulojn...

Mi komprenas tion.

Sed stranga afero, ankaŭ ĉi tie ne ĉiuj konsentas pri mia ekzisto. Oni teroras preskaŭ ĉiutage. Kion ili deziras? Ili ja estas fabele riĉaj! Kontraŭ miaj 3 milionoj ili havas 150 milionan loĝantaron en dudeko da landoj. Sed ili ne povas esti feliĉaj. Simple ne povas. Verŝajne ili esperas, ke mi revenos Ruslandon?

Ne, sufiĉas! Ni jam ne estas nur judoj. Ni estas hebreoj. Mia fusilo, verdire, ne estas armilo la plej moderna. Ili preferas rusan "kalaŝnikov". Sed mi havas ion pli seriozan: radiokomunikilon... Post kelkaj horoj mateniĝos. Mi iras al laboro... Kaj la histriko?

Ĝi venas al la rando de la trotuaro, rigardas, kiel decas, liven - dekstren. Sed io ne ekplaĉis al ĝi. Verŝajne la muziko? Mi ne scias. Ĝi returnas sin kaj malaperas en la sama pordeto.

Nokto. Grandaj steloj rigardas de supre, sed ĉio estas en ordo.

Mi atendas.

AMO KAJ DEVO

Somera nokt'.  
Sur la pad' li lante iris  
Pri l' silent' li pense miris  
Sed lia anim' trankvilon ne akiris,  
Do al si li flustre diris  
-Kial ŝin el mia kor' mi ŝiris?

Ni amis unu la alian reciproke  
Sed la mond' al ni rilatis moke  
Subite iu voĉ' aŭdigis krii voke  
Aŭskultu, vokante vin diras via devo ke  
Forgesu ŝin; vi trovostian poste aliloke.

Kaj li obeis, kaj li ŝin forlasis  
Pasis unu monat', ankaŭ la jaroj pasis  
Multaj horoj de solec' amasis  
Sed la pens' pri ŝi lin daŭre ĉasis.

La finon de tiu rakont' vi ne trovos  
Kiom multe kaj kiel ajn vi provos  
Ĉar la fin' estas nur unu vorto  
Tiu neŝanĝebla fakt': l' eterna morto.

Muŝpelant'





LETERO AL LA REDAKCIO

... En la lasta numero (67 de febr.) mian atenton altiris la artikolo de A. Wandel, en kiu li pritraktas la demandon ĉu stagnas la E-o-Movado.

Laŭ mia opinio, la aŭtoro de la artikolo, sufiĉe pesimisma, nur parte pravas. Sajnas al mi, ke li iom tro idealigas la unuajn, pionirajn jarojn de la E-o Movado, kaj iom tro subtaksas la atingojn en la periodo post la Dua Mondmilito. Se oni prenas en konsideron, ke la du grandaj mondmilitoj necese detruis internacian komunikadon kaj sekvante ankaŭ movadojn fidantajn je humaneco kaj sincera internaciismo, eĉ pli elsaltas la konsiderinda progreso farita en la periodo post la Dua Mondmilito, precipe ekde 1950 ĝis la mezo de 1974. Pri tiuj atingoj troviĝas amaso da koncizaj informoj en la verko E-o en Perspektivo, precipe en ĉap. 18 (p-oj 548-634). La menciita progresado ŝuldiĝas al konscia, multflanka, planita agado, kiu kondukis UEA de unu sukceso al alia, paralele altigis la nombron de la membroj (fakte pli ol duobligis), finance ege fortikigis la Asocion, kaj konsiderinde grandigis la prestiĝon kaj de la lingvo kaj de la Esperanto-Movado.

Se oni estus daŭrigintaj laŭ la sama vojo surbaze de la samaj esencaj principoj, la cirklo, kiun prave mencias la aŭtoro, estus rompita, eble eĉ antaŭ la centjara datreveno en 1987.

La nunan bedaŭrindan staton la aŭtoro eksplikas per ŝanĝigoj en la mondo, kiu fariĝis "pli (eble tro...) efikema, realeca, materialeca". Mi dubas, ke la mondo nun estas pli "materialeca", ol antaŭe. Materiaj fortoj ĉiam ludis gravan rolon en la socio. La nuntempa evoluo de la materiaj fortoj necese puŝas la homaron al integriĝo en diverseco, kaj tio baze favoras la ideon de internacia lingva komunikilo kiel lingva instrumento de integriĝo en diverseco. Do, la materiaj kondiĉoj, inkluzive modernan teknologion, fakte subtenas, certe ne obstaklas, nian ideon. La veraj kaŭzoj de la nuna regreso (interalie, UEA perdis unu kvinonon de sia individua membraro) troviĝas en la E-o Mov. mem kaj ne en la eksteraj cirkonstancoj. Movado, kiu permesas al si la luksaĵon perdi centojn da plej valoraj, sindonaj, kleraj kaj agemaj adeptoj necese obstaklas sian propran progreson. Tion, nur tion oni devus kaj povus sanigi.

Kun estimo kaj koraj salutoj,

sincere via

Prof. D-ro Ivo Lapenna

Honora Membro de Esperanto-Ligo en Israelo.

EL NIA MOVADO KAJ AGADONOVAJ ELEKTOJ EN LA ESTRARO DE ELI

La Estraro de Esperanto - Ligo en Israelo elektis Jeŝiel Ben-Alter (p.k. 379, Petaĥ -Tikva) kiel Prezidanton de la Ligo.

Kiel vicprezidantoj estis elektitaj Naĥum Drezner kaj Jeŝoŝua Tilleman.

Ni deziras al la novelektitoj sukceson en ilia laboro.

JARKOTIZO POR 1980

La Estraro de ELI decidis plialtigi la jarkotizon de membreco por la jaro 1980 ĝis 180 IL.

Ĉiuj israelaj samideanoj estas petataj sendi la monon per la ĉi-aldonita poŝtbanka pagilo.

Jara abonprezo de Israela Esperantisto por eksterlandaj legantoj estas 10 internaciaj respondkuponoj aŭ egalvaloro.

NOVAJ KURSOJ

- La kurso en la Junulara Centro en Tel Avivo komenciĝos la 24-an de oktobro.  
Gvidantoj: d-ro H. Maŝler kaj J. Murĵan. Pri la kandidatoj por la kurso bonvolu sciigi d-ron Maŝler.
- Matilda Landaŭ ricevis proponon gvidi du rondojn en la Lernejo Grec por speciale kapablaj geknaboj en la aĝo 9-10 jaroj.
- La kurso por la progresantoj komenciĝos en la mezo de septembro en la klubejo (Jad Levanim), je la 7-a horo. La kurson gvidas d-ro H. Maŝler. La kurso en la lasta tempo estas gvidata laŭ la metodo de pastro Ce. Materialon por tiu kurso sendis Esperanto-Ligo en Roterdamo.
- La plej granda atingiĝo estas invito de s-anino Anat Zajdman por gvidi kursojn en la formo de oficiala studfako en "Tefnion" (politeknike), Hajfo.
- S-ano Ŝlajn Avraham ricevis proponon gvidi esperantajn rondojn en mezlernejo en Ramat Haŝaron.
- Dum la someraj feritagoj s-anino D. Wunderbaŭm organizis en sia hejmo (en Tel Avivo) kŭvenojn kun la celo pliperfektigi la esperantlingvan esprimkapablon de la partoprenantoj. Ĉirkaŭ 10 ges-anoj partoprenis tiujn ĉi sukcesajn renkontiĝojn.

KLUBAJ VESPEROJ

J. Semer	Humura vespero
E. Haroun	Lumbildoj de Eŭropo. Inter Esp-istoj
A. Wandel	Homaj rajtoj en Israelo
M. Braña	Iu neforgesebla
J. Ben Alter	Pri esp. instruado
A. Ron	La libro de L. Gendling
Ross Collins (gasto)	Lumbildoj de Kenjo
N. Drezner	Kamarada interparolado
H. Mašler	Lumbildoj pri la kongreslando
" "	Pri la kongreslando
J. Giladi	Raporto de UK en Lucerno
Ben Alter kaj Burstein	Raporto pri SAT kongreso
H. Mašler	Diskuto pri la israela ekonomio
E. Haroun	3-semajna Esp.-ferio en Anglio
J. Semer	Raporto pri la Junulara Kongreso
H. Mašler	Lumbildoj pri Rumanio. Mia ekskurso
" "	La diskuto pri la impresoj de Rumanio.

DONACOJ

N. Drezner (kiel amikecan dankesprimon)	500 IL
D. Wunderbaum	500 IL
D-ro J. Gottlib	200 IL

Al ĉiuj tre koran dankon! E.L.I.

MI GRATULAS

Al ges-anoj Eti Kremer kaj Ejal Serusi, okaze de ilia geedziĝo. (Eti kaj Ejal, kiuj plimultigis la nombron de la esperantistaj familioj en nia lando, kune lernis la Internacian Lingvon en 1976, estante tiam "nur" geamikoj).

Al ge-anoj Bilha kaj Jehošua Tilleman, okaze de la naskiĝo de ilia dua filo, Rami.

Al s-ano A. Manor, okaze de la edziniĝo de lia filino.

Al s-ano N. Drezner, okaze de lia 75-jara datreveno de naskiĝtago.

ELI kaj JELI

Solve de krucvorteniĝo de paĝo 17.

Horizontale: 1. apopleksio, 7. ia, 8. uln, 9. brovo, 12. gap, 13. mem, 15. gado, 16. efika, 18. niz, 19. ti, 20. en, 21. iktero, 23. ano, 24. oazo, 25. armea.

vertikale: 1. aritmetiko, 2. pi, 3. la, 4. kur, 5. slogan, 6. invadi, 10. opozicia, 11. ami, 14. efik, 17. kie, 20. eona, 22. ra, .

NOVAJ GESAMIDEANOJ

Bengal - Ĥariš Sara, Erde Jona, Gerškoviĉ Eliza, Hofman Maria, Ironi Raĥel, Jakobson Moŝe, Josef Ŝošana, Koran Matitja, Nisani Ejal, Rosencvajg Lili, Saĥer Miri, Sloser Tibor,

VOLAS KORESPONDI

W.P. Van Schreeven, Molenstraat 40, 4433 A.D. Hoedekenskerke, prov. Zeeland, Nederlando - 59 jara pensiulo, e-isto-veterano, interesigas pri kabalo kaj "mistiko" hebrea. Vizitos baldaŭ Israelon kun sia edzino Joan.

Svedo, oficisto, 60-jara, kun Israelano, pri ĉiuj temoj. - Jan Vedevik, poste restante, 40101 Göteborg I.

Leon Nambin, 7 Rue de Bomel, boîte 4, B-5000 Namur, Belgio - 45 jara instruisto, deziras korespondi kun Israelano 35-45 jara.

Erich Bartonek, Bahnhofring 44, A -8380 Jenndorf, Aŭstrio. Volas interŝanĝi poŝtmarkojn (israelajn pro aŭstriaĵoj). Li volas ricevi poŝtmarkojn uzatajn po 10, 20, 30, 40, 50, kaj li resendas saman nombron de poŝtmarkoj. Li petas filatelan afrankon.

Billy R. Waldon, O.I. DIV, USS Midway CV-41, FPO, SF, CA 96601 U.S.A. 27-jara fraŭlo, ŝipano en la usona mararmeo. Volas veni venontjare al Israelo, elektronika teknikisto. Lia ŝipo havas hejmurbon en Yokosuka, Japanio. Interesigas pri libroj, ĵurnalismo. lingvoj, E-o - movado, mondregistaro kaj pri la pensoj, homoj kaj vivmanieroj en Israelo.

Marijka Siderova, Bulgario, BG-5500 Loveĉ, Blok "Montaĵ-1" Uh G, ap. 4. 40-jara oficistino, pri ĉiuj temoj. Deziras interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn, esp. librojn, bankbiletojn kaj gramofondiskojn.

ANONCO

Por prilaborata "Enhavbibliografio de Esperantaj priodaĵoj 1887-1978" ĉiuspecajn malnovajn E-o gazetojn serĉas: Edward Wojtakowski, P.O. Kesto 312, PL 50-950 Wrocław 2, Pollando. Rekompenco per poŝtmarkoj, E-o libroj ktp.